# La « cunamo » de pornografio




**Pornografio - giganta industrio kiu kreas grandegajn riĉaĵojn - sed kiu samtempe detruas la socion. Dum sia AZK prelego de la 17a de novembro 2018, François Billot de Lochner montris la mekanismojn malantaŭ pornografio.**

La 17an de novembro 2018, okaze de la 16a AZK-kunveno, François Billot de Lochner, prezidanto de la Stop Porno Asocio, prelegis pri la katastrofaj rezultoj de la konsumado de porno. Li opinias, ke la nuna de li nomata « cunamo de pornografio » detruas la personecon de individuo. Pornografio damaĝas profundajn partojn de la cerbo, kie troa konsumado de porno perturbas la sekreciadon de dopamino. Dopamino (hormono kaŭzanta ekscitiĝon) regas bazajn homajn bezonojn, inkluzive de sekseco. La rezulto estas ĉiam plia konsumado de pornografio por satigi la bezonon. Krome, François Billot de Lochner diras, ke pornografio ankaŭ detruas sociajn kaj homajn rilatojn, ĉar virinoj estas perceptataj kiel plezuriloj kaj ne plu kiel plenaj personoj. Homoj, kiuj sin dediĉas al pornografio, emas resti enŝlositaj hejme. Finfine la konsumado de pornografio kondukas al « socia katastrofo », kiu detruas tutajn familiojn. Pornografio estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de eksedziĝo: « Pornografio estas absoluta tragedio. Ĝi estas giganta industrio, kiu kreas grandegajn riĉaĵojn. Morale, ĝi estas aparta rimedo, por detrui la socion. »

**de Sem.**

**Fontoj:**

www.kla.tv/13489

**Ankaŭ tio povus interesi vin:**

#Pornografio - www.kla.tv/Pornografio

**Kla.TV – Novaĵoj alternativaj ... liberaj – sendependaj – necenzuritaj ...**

- ➔ Tio kion la amaskomunikiloj devus ne kaŝi ...
- ➔ Tio pri kio oni aŭdas malmulte, de la popolo por la popolo...
- ➔ Regulaj informoj ĉe www.kla.tv/eo

Indas resti ĉe ni!

**Senpaga abono al nia retpoŝta informilo ĉi tie:** **www.kla.tv/abo-en**

**Sekureca Avizo:**

Kontraŭaj voĉoj bedaŭrinde estas pli kaj pli cenzuritaj kaj subpremitaj. Tiom longe kiom ni ne orientiĝas laŭ la interesoj kaj ideologioj de la gazetara sistemo, ni ĉiam sciu, ke troviĝos pretekstoj por bloki aŭ forigi Kla.TV.

**Do enretiĝu ekstere de interreto hodiaŭ! Klaku ĉi tie:** **www.kla.tv/vernetzung&lang=eo**

*Licenco: Licence Creative Commons kun atribuo*

Oni rajtas distribui kaj uzi nian materialon kun atribuo! Tamen la materialo ne povas esti uzata ekster kunteksto. Sed por institucioj financitaj per la aŭdvida imposto, ĉi tio estas permesita nur kun nia interkonsento. Malobservoj povas kaŭzi procesigon.